

Lego de la komenco de *La Reto* de Bukar
Claude Gacond, 419-a radioprelego, 1971.10.20 & 23

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni prezentis al vi la teatraĵon *La Reto*, kiun ĵus eldonis Dansk Esperanto Forlag. Aŭtoro : Bukar, pseŭdonomo de konata pariza esperantisto.

A.- Hodiaŭ ni legos al vi la komencon de tiu teatraĵo, kiu disvolviĝas en malnova vilaĝa spicejeto. Aktoras Kegel kaj Monika. Hans Kegel eniras tra la stratpordo ; li surhavas malsekan pluvmantelon, kaj tenas valizon ĉemane.

Cl.- Kegel : *Kia vetero ! – Bonan tagon, Fraŭlino!*

A.- Monika : *Bonan tagon, Sinjoro !*

Cl.- *Oni diris al mi, ke meblitan ĉambreton mi povos lui ĉe vi.*

A.- *Kiu sendis vin... ?*

Cl.- *La sekretario de sinjoro Vernoux, la loka agente de la asekura kompanio Zeus. Lin mi anstataŭas ; mi estas sendita de la ĉefoficejo en Parizo... Pro tio mi serĉas loĝejeton por kelkaj monatoj...*

A.- *Ha ! Ni ja havas ĉambron... kaj kelkfoje ni luigas ĝin... sed... estas tre malbela, malbona ĉambro... fluantan akvon ĝi ne havas !*

Cl.- *Ne gravas... Kiom estas la luprezto ?*

A.- *Cent frankoj monate !*

Cl.- *Prezo modera ! Mi luas tiun ĉambron ! (Li malfermas sian monbiletujojn, prenas el ĝi bileton je cent frankoj, etendas ĝin al Monika) Jen por unu monato antaŭe !*

A.- *Ĉu vi ne preferas unue vidi la ĉambron ?*

Cl.- *Kial ? Mi prenas ĝin tia, kia ĝi estas ! Mi ja ne havas eblecon por elekti, mi ja bezonas loĝi ie ajn, kaj la sola hotelo en Preval, Hotelo de la Ora Leono, nun estas malkonstruata !*

A.- *Bone ! (Ŝi prenas la bileton) Dankon, Sinjoro !*

Cl.- *Ho, Fraŭlino, bonvolu doni al mi kvitancon !*

A.- *Jes, Sinjoro !*

Cl.- *... ĝin mi bezonas por mia kalkulo de elspezoj !*

A.- *Kio estas via nomo, Sinjoro ?*

Cl.- *Kegel, Hans Kegel ; K.E.G.E.L. Mi neniam vidis iun, kiu tiel bone skribas per maldekstra mano. Ĉu jam de longa tempo vi estas tiel ?*

A.- *Jes, jam de longa tempo. Ho, tian kvitancon devas subskribi Panjo ! Kaj ŝi ne estas hejme momente; ŝi iris al dentisto.*

Cl.- *Ne gravas ! Ĝin subskribu mem ! Estas nur por la kompanio ! (Post mallonga hezito, Monika subskribas la kvitancon ; ŝi faldas ĝin, akrigas la faldon per la ungo de sia polekso, kaj kun multe da pacienco ŝi klopodas unumane disigi ĝin de la kvitancaro ; Kegel etendas la manon por helpi ŝin).*

A.- *Ne zorgu, Sinjoro ! Tion mi povas fari sen helpo. Mi estas lerta ! (Fine, ŝi sukcesas, kaj donas la kvitancon al Kegel; li metas ĝin en sian biletujojn ; dume ŝi paŝas dekstren, por*

Lego de la komenco de *La Reto* de Bukar
Claude Gacond, 419-a radioprelego, 1971.10.20 & 23

ĉirkaŭiri la vendotablon; tiam la spektantoj rimarkas, ke ŝi estas unubraka; ŝi alproksimiĝas al Kegel por preni lian valizon.) *Donu al mi vian valizon, Sinjoro !*

Cl.- *Ne, ĝi estas tro peza ! Iru antaŭen kaj montru al mi la vojon !*

A.- (Monika turnas sin, iras supren per helico-ŝtupareto ; Kegel sekvas ŝin).

Cl.- *Kial la hotelo estas malkonstruata ?*

A.- *Ĉar ĝi bezonas gravajn riparadojn.*

Cl.- (Ili malaperas ; tamen oni daŭre aŭdas iliajn voĉojn.)

A.- *... estas tre malnova, kaj la posedanto ne deziras elspezi monon por tio ; li ne plu havas klientojn !*

Cl.- (Bruo de pordo malfermata ; la voĉo de Monika malpliĝas.)

A.- *Antaŭe ni havis grandan vojon tra Preval... Sed, de kiam ĉirkaŭa vojo estis konstruita, ...*

Cl.- (Eniras leterportisto.)

A.- *ni ne plu vidas multe da vojaĝantoj ĉi tie.*

Cl.- Leterportisto : *Ho. Ĉu neniu ?*

A.- *Mi venos tuj !*

Cl.- (Ŝi malsupren iras laŭ la ŝtupareto.)

A.- *Ho, bonan tagon, Sinjoro ! Mi estis supre, kaj...*

Cl.- *Ne gravas, Fraŭlino, ne gravas ! Kial kuri kiel frenezulo ? Mi ja havas tempon ! Jen registrita letero por via patrino !*

A.- *Ha, sed ŝi ne estas hejme ! Ŝi estas ĉe la dentisto.*

Cl.- *Ne zorgu ! Subskribu anstataŭ ŝi ! Mi ja bone konas vin ! Dankon, Fraŭlino. Ĝis la revido !*

A.- *Ĝis la revido, Sinjoro !*

Cl.- (La leterportisto eliras. Monika nervostreĉe malfermas la leteron, premante ĝin kontraŭ la vendotablo per sia femuro ; kaj tenante la kovrilon inter siaj dentoj, ŝi eltiras plurajn tajpitajn foliojn, rapidege tralegas ilin ; tuj ŝia vizaĝo montras grandan ĉagrenon, ŝia mano ekstrema. Tiam Kegel iras malsupren.) *Kio okazas al vi ? Ĉu vi ricevis malbonan sciigon ?*

A.- *Ne... ne ! Estas... nenio.*

Cl.- Jen do la komenco de tiu teatraĵo *La Reto* de Bukar. Vi certe deziras vidi la reston : tiam iru al Parizo, kie ĉiuvespere ĝi estos ludata dum tiu ĉi aŭtuno. Aŭ aĉetu la libreton ĉe via esperanto-libroservo.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando

Cl.-. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-